

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

## PUBLIKA LETERO.

al dro Fritjof Nansen kaj lia komisario Gibson.

Jus mi ricevis sciigon, ke profesoro de la universitato en Tomsk, konata scienculo kaj verkisto Vasilij Ivanoviĉ Anuĉin estis en la nokto de 18. al 19. Septembro 1922 denove arestita. Kelkajn tagojn antaŭe estis s-ro Gibson en Tomsk kaj alportis leteron de dro Nansen al Anuĉin. Post la forveturo de s-ro Gibson okazis en Tomsk multaj senliberigoj. Sajnas, ke la sovjeta registaro en Tomsk aljugas al la letero de dro Nansen kaj interparolado kun s-ro Gibson grandan politikan signifon, sed laŭ la ricevita sciigo oni pritraktis nur la novan ekspedicion de Anuĉin al nordaj regionoj de Siberio. Ankaŭ al mi sendis Anuĉin prospekton de la proponita ekspedicio, sed mi ĝin bedaŭrinde ne ricevis.

Mi estas konvinkita, ke la centra sovjeta registaro en Moskvo ne devus agi tiamaniere, jam tial, ke Anuĉin estas tre estimata homo en Siberio.

Anuĉin sentas sin malfortigita de ofta areŝtado kaj de la teruroj de mondbatalado kaj ĝiaj sekvoj. En aŭtuno de la lasta jaro oni lin arestis por tri semajnoj en Novonikolajevsk, poste li estis dum du monatojn grave malsana. La registaro de Tomsk malpermesis al li instruadi en la universitato, eldonadi siajn verkojn, eĉ labori aŭ ie servi kaj nun forprenis la kvitancon por ia kvanto da nutraĵoj — kondamnis lin tiamaniere al morto pro malsato!

Helpu rapide!

Prof. F. J. Havelka,  
aŭtoro de libro »Siberio«,  
Praha III./38. Bohemujo.

## SLOVAKUJO.

Laŭ antaŭmilita artikolo de K. Kálal skribas V. Kryštof.

Slovakujo, la nordokcidenta parto de iama hungarujo kie loĝas Slovakoj, ne estis siamtempe memstara lando kiel ekzemple Bohemujo aŭ Moravio.

Cirkaŭ la jaro 830 loĝis en la kastelo Nitra nobelo Pribina (Privina), kies nomo estas la unua slovaka nomo aperanta en historio. Li estis estro de ceteraj slovakaj »jupanoj«. Ne estas konate, ĉu li estis tute sendependa de Mojmir, la duko de Moravio, aŭ ĉu li estis lena duko. Sed estas certe, ke inter j. 833—836 Mojmir rorigis Pribina pro nekonata kaŭzo kaj la duklando Nitra kuniĝis kun Moravio, estante lena duklando.

Tiel la duklando Nitra, la nuna Slovakujo, aperas sur la mezeuropa scenejo. De tiam ĝi kelkfoje ŝanĝis la regantojn, jen estante parto de la Ceha Duklando (sub Boleslav I. kaj II. en j. 955—999), jen de la Duklando Pola (sub Boleslav la Kuraĝa en j. 999—1025). Dum la ĉeĥaj dukoj ĝi limis sude kun la riveroj Danubo kaj Matra (laŭ la historiisto Palacký) kaj la pola historio diras al ni, ke dum la regado de Boleslav Kuraĝa, Polujo (kun Slovakujo) etendiĝis ĝis al la riveroj Danubo kaj Tisa.

En la jaro 1031 la duklando Nitra estis kunigita kun Hungarujo. Sed eĉ poste vidiĝas ĝia individualeco. En la jaroj 1301—1321 en Slovakujo regis memstare Matouš Ĉak el Trenĉin kaj dum kelkaj jarcentoj poste oni nomis Slovakujon »lando de Matouš«.

Sinjoro Jiskra el Brandýs regis en Slovakujo dum la jaroj 1440—1462. De kiam Jiskra submetiĝis al Mathyas, Slovakujo portas en la hungara leĝaro la nomon »Supra parto de Hungarujo« aŭ »Supra Hungarujo«. Sasinek, la slovaka historiisto diras, ke en tiu tempo Slovakujo havis en la ŝtata parlamento sian ĝeneralan ĉefon kaj ke ĝi ofte reprezentis separatan parton de la ŝtato, aŭ ĝiaj reprezentantoj kunvenis en memstara parlamento.

Dum la hungaraj ribeloj kontraŭ Vieno staris Slovakujo — grandparte protestanta — flanke de ribelantoj. Tököli, la ĉefo de tria ribelo, lasis sin en j. 1682 proklami vasalduko de la turka sultano, kunvokinte en Košice parlamenton, kie li lasis sin elekti duko.

La nomo »Slovakujo« datiĝas de tempo pli nova. En j. 1817 juna slovaka patrioto Johano

Benedikti, kiu tiam studis en Jena, skribis al la historiisto Fr. Palacký esprimante bedaŭron, ke lia patrujo ne havas nomon. Slovako Ribay klarigis al ĉeĥa nacia vekanto Dobrovský, ke liaj samlandanoj de longa tempo sin nomas »Slovakoj« kaj ne »Slavoj de Hungarujo«, kiel li ilin nomis.

Oni ne sukcesis eltrovi, kiu la unuan fojon uzis la nomon »Slovakujo«, sed la slovaka historiisto Botto opinias, ke tion faris Hurban. Definitive ĝi aperas en j. 1844 en la kanto (nun la slovaka nacia himno) »Nad Tatrú sa blýská« en la vortoj: »Jam Slovakujo vekigas...« (La kanto estas komponita de Matuško.)

En la magiara lingvo de pratempe oni diras »Tótság«, tio estas: Slovakujo.

ooo

JOSEF ŠIMÁNEK:

### EKREVO DE DON JUAN.

Josef Šimánek, tre talentita ĉeĥa poeto kaj novelisto, naskiĝis 1883 en Jindřichův Hradec. Li estas doktoro de filozofio kaj verkisto vivanta en Praha. En liaj poemoj kaj rakontoj oni rimarkas amon al antika mondkompreno kaj ofte apoteozon de volupta amo. Potenca poeta fajro karakterizas lian verkaron. (R. F.)

Dona Sul ĵus malaperis en tapeta pordeto de verda salono kaj Don Juan rigardis la tapiŝon, kvazaŭ li serĉus la postsignojn de ŝiaj piedoj sur ĝi. Sur la kristalpokalo, kiu portis postigojn de ŝiaj lipoj, kuŝis ombro ĵetata per statuoj de Venuso, kvazaŭ malĝojo de diimo,



### FELIETONO

B. TITL:

#### EN BELGIJON.

Ne estas kutimo fari longan ekskurson en la fino de oktobro, ĉefe ne, se tiu monato distingiĝas pro preskaŭ senĉesaj pluvoj, kiel la nunjara oktobro. Sed ĉu estis eble preterlasi la allogan rekomendon de nia Popola Universitato de Hus pri organizo de kelktaga ekskurso al Belgujo, al tiu bela lando kun sia brava kaj simpatia popolo, kies dum milita suferado nin tiom emociis? Ni Ĉeĥoslovakoj amas Belgion kvazaŭ ĝi estus fratino de nia propra lando kaj tial estus tre domaĝe ne uzi la okazon, kiu sin prezentigas por ĝui ĝian belecon, spiri ĝian aeron kaj admiru ĝian popolon... Kaj por ni, esperantistoj, la afero estas speciale alloga: ni ja renkontos tie samideanojn, en kies rondo ni tute forgesos, ke nia hejmo estas malproksima...  
\* \* \*

Ĉirkaŭ la kvara matene ekhaltis nia vagonaro en la landlima stacio Cheb kaj nia deksemembra karavano post nelonge prezentis sin al la ĉeĥoslovakaj kaj germanaj limoficistoj. La ceremonio ne daŭris longe. Baldaŭ ni denove sidiĝis en vagonaron kaj ekveturis kontraŭ Nürnberg, la estonta kongresurbo. Ekstere estis malvarme kaj mallumo kovris ĉion, sed en nia kupeo estis varme kaj agrable. Iu komencis rakonti anekdoton kaj lia bona humoro

kui kutimiĝis regadi en krepuska silento de ĉi tiuj salonoj... Ĉi tiu malĝojo estis ja pravigita: Amo cesis regi en la ĉambroj de iuksa palaco de Don Juan; revo eklogis en li kaj eniris kastelon tuj, kiam la tapetpordo fermigis post Dona Sol. Iom da vino restis en la kristalaj pokaloj. Don Juan rigardis ĝian orangtlavon, ombrigitan de Venuso; ĝi similis nun al flavo de iandiginta vakso el kandelo apud piedoj de ŝtona kavaliro en preĝejo. Ĝi estis stranga kaj malĝoja flavo. Don Juan ekdeziris ĉi tiun topazan malĝojon. Li suĉis ĝin el la kristala pokalo, sur kiu ankoraŭ antaŭ momento ripozetis la palaj lipoj de Dona Sol... Li suĉis ĝin kiel tuberozan bonodoron, kiel la spiron de l' morto, kaj la ardoro de vino el Xeres kaŝis hodiaŭ en si strangan malvarmon, kiu penetris tra ostomedolo. Kvazaŭ malvarma koro puŝadis glacian sangon en ardigatajn vejnojn...

Don Juan fermis la libron de sia amo. Li skribis en ĝin la lastan nomon: Dona Sol. Nun li vivos nur en revo saturita de vino. Lia tuta palaco estis jam aranĝita por ĉi tiu celo, kaj fermita por ekstera mondo. Same ĉiuj ĉambroj de lia kastelo estis adaptitaj por revado kaj forkuro el vivo. La revo multobligas sennombre la vivon, okazintaj fariĝas nuraj motivoj de gigantaj ĥimeroj de l' animo, nuraj impulsoj batigantaj kiel ondoj la altajn sferojn de koro ŝanĝita al spirito.

Leporello ekbruligis lampojn en la ĉambroj de palaco de Don Juan, kies fenestroj estis kurtenigitaj tiel sekure, ke ne penetris eĉ unu radio el la interna vivo en la eksteran pro-

facile infikis ĉiujn. Serco sekvis ŝercon kaj en ĝenerala rido ni apenaŭ rimarkis la tagiĝon. Estis la oka, kiam la vagonaro haltis en Nürnberg. Jen ni povis komode matenmanĝi en la restoracio de vastegea stacidomo kaj ankoraŭ fari promenon tra la belega urbo, ĉar nia vagonaro veturis nur je la dek unua. Ni trapasis kelkajn stratojn observante la riĉe provizitajn komercejojn kaj ni turnis nin al la malnova parto de la urbo. Kelkfoje ni preterpasis la restojn de mezepokaj fortikaĵoj, la atestantojn de tempoj forpasintaj, sur kiuj iam promenis bravaj defendantoj de la urbo. Tiuj monumentoj de estinteco strange diferencigis de modernaj promenejoj, plenaj da belaj sinjorinoj kaj elegantaj sinjoroj. Preskaŭ ni bedaŭras, ke ni ne povas resti tie ĉi pli longe. Sed la scio, ke dum la Dekkvina ni povos libervole admiru la lokajn interesajn monumentojn, konsolas.

La dek unua horo trovis nin sidantaj en vagonaro. Nian kupeon ni ornamis per esperanta kaj ĉeĥoslovaka flagoj, kiujn ni portis kune. Nia gaja humoro estis daŭra kaj unu horo rapide sekvis la alian. Ie apud Frankfurt a. M. ni rimarkis, ke unu sinjoro ofte paŝas preter nia kupeo kaj malafable rigardas en ĝin. Eliris s-o Pavlik, la prezidanto de Esp. klubo, por informiĝi kio okazas. Baldaŭ li revenis kun la sciigo, ke la fremda sinjoro incitigis pro ekvido de nia nacia flago kaj ke li ordonas ĝin forigi. Ni estis surprizitaj per tiu postulo, sed

fanan mondon. La ĉambroj havis lampojn de malsamaj koloroj, respondantaj al diversaj vivofazoj de Don Juan, al iliaj kapricoj kaj animstatoj. La lumoj havis laŭcele tiel elektitajn nuancojn, ke ili momente reproduktigis tutajn epizodojn de erotikaj okazintaĵoj, iliajn tutajn esencojn kun la mistero de iliaj parfumoj kaj kapricoj. Ĝi estis vivo, tuta vivo de Don Juan, reprezentita per diverskoloraj lumoj, ia lumanta kaj diskreta konfeso de demokatega menso, kiu eĉ antaŭ la stolo de konfesrenanto travivas voluptigajn sensaciojn.

Kaj tiel okazis, ke en la unua ĉambro kun lumo helflava, rememoriganta nematurajn citronojn el regiono apud Pireneoj, Don Juan denove travivis tutan sian amon al Beatrice, amon ne findiritan, similan al floroj, kiuj forvelkis jam en stato de burĝonoj. Ŝi foriris kaj edziniĝis. Kiel edzon ŝi prenis riĉan kaj potencan nobelon. Post kelke da jaroj ŝi maljuniĝis, la komponatindulino. Nur ŝiaj migdalformaj okuloj konservis sian naivan ekmirigon de neinformita junaĝo.

Don Juan eniris ĉambron kun intensa orangkoloro. En lia animo aperis belulinoj orharaj sed de temperamento sangvina... Gaud, kun okuloj de serafino kaj koro de Astarto, kiu lertis ŝanĝi en brulantan torĉon, vualite en barbareca oro de siaj longbukloj, defluantaj kiel ondoj de faireroj, sprucintaj el avida nekontentiga spirito. Don Juan travivis sian duonan infimecon inter la bedoj de sekretplena parko, saturita de odoro de lavendoj, pleniĝita de ombroj de famariĝoj, kisoj venenigaj kiel serpentmordoj, plenaj da pekoj, da

ĵaluzeco kaj malamo... Kaj jen li vidis krucmetitajn spadojn, sian kaj tiun de Don Alvaro, kiel du lunradioj serĉantaj sin kaj lumoscilantaj sur la fundo el blua veluro. Li vidis la paliĝantan vizaĝon de Don Alvaro, nigrajn rozojn sur bedo, rozkolorigitajn per varmega roso.

Kaj kiam li troviĝis en ĉambro kun helblua lumo kaj sentis la malvarmajn kaj timemajn kisojn de Dona Klara, Mallonge ŝi rezistis. Ŝi estis el tiuj, kiuj fariĝadis tuj lia rabajo kaj tamen ŝi apartenis al la plej grandaj triumfoj de lia vivo. Ŝi fariĝis monaĥino. Malhela ŝtalgrizo de ŝiaj okuloj de brunulino paliĝis en brilo de vaksandeloj kaj akiris reveman bluan de printempa firmamento, kiun tiel belaspektigas la lunkvarono, sur kiu virgulino piedpremas la kapon de serpento.

Fl la blua salono paŝadis Don Juan en rozkoloran, poste en violbluan kaj fine en ruĝan ĉambron. Denove li travivis sian tutan vivon koncentritan en kelkajn minutojn, ebrigitan kiel odoro de la plej venenigaj floroj. Denove li vidis kadavrojn de siaj rivaloj kun ruĝaj rigidigantaj floroj sur maldekstra flanko de la brusto kaj aŭdis ĝemojn de forlasitaj virinoj kaj knabinoj, kiuj trairis kelkajn horojn de lia vivo, al kiuj ili ĉiam revenadis denove, kiel frenezulo al sia monomanio.

La ruĝa ĉambro kaŭzis al Don Juan la plej grandajn impresojn kaj voluptojn, plej riĉe plenflorantaj. Ĉiuj satanaĵoj, kiujn li dum vojaĝoj renkontis, paŝis preter li, ridetis al li per dikeco de siaj linoj kaj rabemeco de blankegaj dentoj avidaj pri sango kaj viktimo.

vidante la minacan aspekton de la sinjoro, ni forigis ĝin.

La vagonaro ruliĝis rapide sur la reloj. Ni atingis Rejn-teritorion, okupatan de Ententaj trupoj. En stacioj, kie haltis nia vagonaro, ni povis vidi soldatojn francajn, anglajn aŭ amerikajn. Ni veturis sur la maldekstra bordo de Rejno en belega valo borderumita de altaj deklivoj. Tra la fenestro de nia kuneo ni admiras la pentrandan regionon. La deklivoj kontraŭ sudo estas kovritaj de multaj vinberujoj aŭ de folioriĉaj arboj. La nedireblaj belaj koloroj de mortantaj arboj pligrandiĝas la helecon de la valo. Jen kaj tie aneras ruino de kastelo. Kvazaŭ en grandega kaleidoskopo ŝanĝas sin la scenejo, kiu prezentiĝas al niaj okuloj. Unu vilaĝo sekvas alian, unu urbo malaperas kaj alia montriĝas.

Fine — estas preskaŭ la dek unua vespere — ni estas en Deutz, urbo kuniĝita (de la jaro 1888) kun Köln a. R., la celo de nia hodiaŭa vojaĝo. Ni iras en la hotelon kontraŭ la stacidomo nomatan »Zum Heidelberger Fass«, kie la kancelario de la Popola Univ. mendis por ni ĉambrojn. Post abunda kaj laŭ nia mono tre malkara vespermanĝo ni okupas la ĉambrojn. La litoj ĉie estas duoblaj — por du personoj — kovritaj per dikaj kovriloj kaj negranda kvadrata kuseno.

Matene ni kunvenas en la restoracia salono kaj post matenmanĝo konsistanta el kafo kaj bulko kun

butero ni forlasas la hotelon. Irinte sur grandega fera ponto trans la Rejno ni baldaŭ venas en la ĉefan stacidomon de Köln. Sed ien ni sciiĝas, ke nia vagonaro jam forveturis kaj la plej proksima veturo post la unua posttagmezo. La liberan tempon ni do uzas por promeni tra la urbo. Nia aro dividiĝas kaj ĉiu povas uzi la tempon laŭ sia volo. Mi kun s-o Nedvĉed, redaktoro de »Nová Doba« kaj f-ino Lábková sidiĝas en aŭtobuson por fari rondvojaĝon tra la urbo. Ĝi daŭras iom longe, sed ni ne havas kaŭzon bedaŭri, ĉar ni tiel bone vidis la belan urbon.

Denove ni sidiĝas en vagonaro, kiu post kvin horoj estas nin transportanta en la Belgan metropolon Bruxelles. Ni parolas pri la impresoj ĝis nun travivitaj kaj la tempo denove rapide forpasas. Tiel ni atingas Herbesthal, la stacion sur la belga landlimo. La revizio okazas tie ĉi en la vagonaro. Antaŭe venas germanaj limoficistoj, kiuj sciinte, ke ni estas ĉeĥoslovakaj ekskursantaj al Belgio, lasas nin en trankvilo. Poste venas Belgoj. Ili ekzamenas niajn pasportojn kaj notas tie la daton de nia alveno. Niam vakaĵojn ili ne traserĉas, post nia deklaro, ke ni havas kune nenion por limdenago. Post tiu ĉi ceremonio, multe pli simpla ol sur la landlimo ĉeĥoslovaka-germana, la vagonaro denove ekveturas kaj post nelonge ni troviĝas sur la belga teritorio. (Daŭrigo.)

Jes, ĉi tie estis la zenito de l' vivo! Skarlato de sango, purpuro de rozoj, kiuj malfermiĝas, pasia rido de satana ruĝo! Kvazaŭ la tuta infero estus koncentrita inter ĉi tiuj kvar muroj.

Don Juan paŝis al la lasta pordo. Je stranga hazardo li ankoraŭ neniam en sia vivo ĝin malfermis. Ĝis nun li ne interesiĝis pri ĝi. Kio estas kaŝita post ĝi? Kio povas superi tiun purpuron?

Don Juan malfermis la pordon. Li ekhaltis konsternigite kaj lia facilanima, post vino ardanta vizaĝo, subite ekpaliĝis; kontraŭ li, ĝuste ĉe la malantaŭa muro de nigra salono, staris diablo kun ruĝa mantilo kaj kun spado ĉe flanko. Du kornoj de Astarto brilis super lia majesta kapo.

Don Juan instinkte ektuŝis sian spadon kaj vidante similan defendmovon ĉe enrudulo, atakis lin per eltirita armilo...

Tintado de vitro eksonis kiel malvarma ridego tra la koloraj ĉambroj. Kaj kiam la servistoj alarmigitaj de bruo alrapidis kun trioblaj lumoj en arĝentaj kandelabroj, ili ekvidis sur la malantaŭa muro de nigra salono frakasitan spegulon.

Tradukis Fr. Válka.

## DE LA LINGVA KOMITATO.

Paris, 5. Nov. 1922.

Kara kolego!

Mi sendas al vi:

1. La rezultaton de la voĉdonado de la Lingvaj Komitatoj:

a) pri landnomoj:

b) pri la kreado de Akademijaj korespondantoj.

2. La plenan liston de la nunaj L.-Komitatoj.

### Voĉdonado pri landnomoj.

Post raporto de prof. Grosjean-Maupin la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la demando: »Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia ŭj?« respondis:

9 jes, 2 ne, 1 duba voĉdono.

Al la demando: »Ĉu vi aprobas la fidelan sintenadon de la Akademio en la landnoma demando?« respondis 87 L.-K-anoj:

74 (2 kun rezervoj) jes; 5 ne; 2 dubaj voĉdonoj; 6 sin detenis de voĉdono.

### Voĉdonado pri kreado de Akademijaj korespondantoj.

Al la demando: »Ĉu vi aprobas la kreadon de Akademijaj korespondantoj kaj rajtigas la Akademion elekti, se bezone, eĉ ne L.-K-anoj?« respondis 87 L.-K-anoj:

72 jes; 8 (kondiĉe ke ili estu aŭ fariĝu L.-K-anoj) jes; 1 ne; 6 sin detenis de voĉdono.

Seke al nia Regularo estos aldonata jena paragrafo XII. 21 (in fine):

»La Akademio havas la rajton elekti, eĉ ekster la L. K., se bezone, Akademijajn korespondantoj. — Se ili ne estas jam L.-K-oj, la Akademio petos de la L. K. aprobon, dank' al kiu ili fariĝos L.-K-oj. —

Ilia nombro ne devas superi la trionon de la Akademianoj.«

La elektoj en la L. K-aton okazos dum la unuaj monatoj de 1923, — en la Akademion poste, antaŭ Nürnberga Kongreso.

Kun kora saluto via tre fidela

Th. Cart,

prezidanto de la L. K-ato.

○○○○

## ALVOKO DE LA IX. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ.

Al la esperantistaj verkistoj!

La Komitato de la IX. Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj:

**Ordinaraj temoj:** I. Originala versaĵo kantanta Amon. II. Originala Ama verko en prozo. Premioj: Lukse bindita libro »Vivo de Zamenhof« de E. Privat.

**Eksterordinaraj temoj:** I. Premio de la Ekscellenca Urbeŝtaro de Manresa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola. — II. Premio de la »Mankomuneco de Katalunio«: Kolekto de la verkoj de la mezepoka kataluna filozofo Ramón Lull. Temo: Laŭvola. — III. Premio de la Parlamenta Deputito S-ro Josep Creixell: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola. — IV. Premio de la Deputitoj de la Kataluna Mankomuneco S-roj Valls, Borràs, kaj Minoves: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — V. Premio de la Manresa grupo »Bela Espero«: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — VI. Premio de »Amikoj de la Popola Kulturo« de Manresa: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — VII. Premio de la Gazetara Asocio de Manresa kaj regiono: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — VIII. Premio de »Centre de Dependents de el Comerç i de l'Indústria« de Manresa: 25 pesetoj. Temo: Esperanto ĉe la asocioj de komercaj komizoj. — IX. Premio de la Manresaj »Pomelis de Joventut«: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola. — X. Premio de la »Manresa Orfeono«: Artobjekto. Temo: Carmo de la muziko. — XI. Premio de la fama »Bazaro Jorba« de Manresa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola. — XII. Premio de la »Ekskursista Societo« de la Bages'a regiono: Artobjekto. Temo: Laŭvola. — XIII. Premio de la Manresa »Laborista Ateneo«: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — XIV. Premio de »Montepio Artesà« de Manresa: 50 pesetoj kaj honora diplomo. Temo: Mutualismo. — XV. Premio de la »Terkulturista Ĉambro de l' Bages«: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola. — XVI. Premio de »Enciklopedia Popola Ateneo« de Barcelona: 25 pesetoj. Temo: Traduko de la popola kataluna kanto »La presó de Lleida«. (Havigos le plenan tekston la Sekretario de la Floraj Ludoj.) — XVII. Premio de la esperanta societo »Nova Sento« de Barcelona: 75 pesetoj. Temo: Versaĵo el du strofoj enhavantaj ĉiu 12 liniojn, adaptebla je muziko kaj taŭca kiel himno de la Societo »Nova Sento«. — XVIII. Premio de la grupo »Barcelona Stelo«: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. — XIX. Premio de »Kataluna Esperantisto«: Dumviva abono al la gazeto. Temo: Severa unueco, nepra kondiĉo de internacia lingvo.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

E. Grosjean-Maupin, prezidanto. — Josep Albagés. — Louise Briggs. — Delfi Dalmau. — Artur Doménech. — Marian Solá, sekretario.

Barcelona, Septembro 1922.

Notoj:

La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

La Festo de la IX. Floraj Ludoj okazos en Manresa dum la Xa Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio la proksiman Aprilon.

Al la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 31a de Januaro 1923 de la Sekretario S-ro Marian Solá en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (str. Carme, 30, Barcelona) — oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

ooo

## DE LA INTERNACIA LABORA OFICEJO.

### Rimarkinda Konsultlibro. Tutmonda Labora

#### Adresaro.

Ĉiuj personoj interesigantaj iamaniere pri demandoj rilate al industrio kaj laboro trovos ke unu el la plej altvaloraj konsultlibroj por ili estas la dua ĉiujara eldono de la Internacia Labora Adresaro, ĵus publikigita de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj. Tiu ĉi volumo estas presita en angla franca kaj germanaj lingvoj, kaj enhavas sciigojn pri registaraj departementoj kaj privataj organizaĵoj sin okupantaj pri laboro kaj industrio en 72 landoj, sciigojn ne haveblajn aliloke.

La personaro de la Internacia Labora Oficejo penis kiom eble plibonigi kaj plivastigi la unuan eldonon publikigitan lastan jaron, kaj la nuna eldono enhavas informojn pri pli ol 1.800 mastraj asocioj, 2.300 laboristaj organizaĵoj, 600 intelekt-laboristaj asocioj, 43 eksbatalantaj grupoj, 450 kooperaj societoj kaj ĉirkaŭ 40 diversspecaj internaciaj institucioj. La nombro de paĝoj estas plimultigitaj de 600 al 1.000.

Oni treege zorgis fari kiel eble plej kompletaj la sekciojn enhavantajn tabelformajn listojn de la plej gravaj mastraj kaj laboristaj organizaĵoj en la diversaj landoj. Tiuj ĉi listoj donas ne sole la nomojn kaj adresojn de tiuj ĉi organizaĵoj kaj la nomojn de iliaj ĉefaj oficistoj, sed ankaŭ la titolojn de ili gazetoj eldonataj de ili, la lastajn disponeblajn ciferojn pri nombraro, aŭ la nombro de firmoj aliĝintaj al mastra organizaĵo, kaj la naciaj kaj internaciaj aliĝoj de ĉiu organizaĵo.

Aliaj sekcioj aperantaj la unuan fojon en la nova eldono enhavas similajn listojn de naciaj kaj internaciaj organizaĵoj sin okupantaj pri intelektaj laboristoj.

ooo

## LEGOLIBRO.

### La juna povas, la maljuna devas.

La mondo estas bela kaj donas al ĉiu multajn ĝojojn; ĉiu povas ilin eluzi, nur se li volas. Sed la korpo same kiel la animo devas esti sana. Kiam la homo estas malsana kaj senforta, nenio povas lin ĝojigi, multaj aferoj restas flanke sen uzo kaj ĝuo.

Mi rememorigas la renkontiĝon kun maljuna, blankhara avo. Lia korpo de daŭra laboro kurbigis, li estis kaduka sed tamen li ĉiam ploris, ke li ne povas labori restante nur hejme por gardi infanojn.

Antaŭ la domo li sidas kaj kun larmoplenaj okuloj rigardas ien al horizonto, kie brilas lasta postsigno de la tago.

Subite karese tuŝas iu lian manon.

»Avĉjo, rigardu, mi estas jam sana; mi ne mortis — —«

La avo klinis la kapon.

»Avĉjo, vi ne mortos, ne timu; mi vin gardos kaj protektos kontraŭ la morto.«

Avĉjo silentis, en lia maljuna kapo aperas rememoroj el malproksima infaneco — —

Kaj kiel rezulto tremetas sur liaj lipoj:

»Karulino, la juna povas sed la maljuna devas.«  
Stuchlíková.

### Al ni!

(Dediĉita al oferema esperantistino f-ino R. K.)

Se falos niaj fortaj vicoj,  
se ĉiu iros sola, mem,  
ni perdos multan bonan forton,  
kaj ĝermos nur malbona sem'.

Per forto ne, per ama voĉo,  
ni iros vojon de la mez'  
kun man' en mano nur antaŭen  
trans barikadojn de la pez'!

Kaj se ni restos sur la kampo  
nur kelkaj, kiel mola kan'  
ni venke kantos, ĝoje spiros,  
kun verda flago en la man'.

Kaj kiu hezitante klinos  
la kapon sian en malĝoj',  
vi iru for — ni marŝos pluen  
ĉar sankta estas nia voj'!

Nur tiam plenaj restos haloj  
de nia ideala dom',  
se iros frato kun la frato,  
se iros homo kun la hom'.

Ho, sankta brilo de l' Espero,  
vi gardu nin ĝis tiu tag',  
en kiu alte, vaste flirtos  
kun verda stelo nia flag'!

Riedl.

ooo

## INFORMO.

### Rakonto de A. Ĉefov.

Estis tagmezo. Bienposedanto Voldirjov, altkreska bone nutrita viro kun tonditaj haroj kaj elstarantaj okuloj, demetis la pelton, viŝis per silka tuklo la frunton kaj senkuraĝe eniris la oficejon. Tie oni plumknaris...

Kie mi povas ĉi tie ricevi informon? li demandis la pordiston, kiu portis el la malantaŭaĵo de la oficejo pleton kun glasoj. Mi devas ĉi tie informiĝi kaj fari kopion de ĵurnala decido.

Bonvolu iri tien! Jen al ĉi tiu, kiu sidas ĉe la fenestro! diris la pordisto, montrinte per la piedo al la lasta fenestro. Voldirjov ektusis kaj sin direktis al la fenestro. Tie malantaŭ la verda tablo sidis junulo kun kvar hartufoj sur la kapo, kun longa aknohava nazo kaj en senkoloriĝinta uniformo. Enmetinte sian longan nazon en la paperojn li skribis. Apud lia dekstra nazotruo promenis

muŝo, kaj li ĉiam eltiradis la malsupran lipon kaj blovis al si sub la nazon, kiu igis lian vizaĝon ŝajni tre okupata.

Cu mi povas ĉi tie... ĉe vi — sin turnas al li Voldirjov — ricevi informon pri mia afero? Mi estas Voldirjov... kaj samtempe mi bezonas preni kopion de la ĵurnala decido de la dua de Marto.

La oficisto trempis la plumon en la inkujon kaj ekrigardis, ĉu li ne prenis tro multe da inko. Konvinkiginte, ke de la plumo ne gutas, li ekknaris per la plumo. Lia lipo eltiriĝis, sed blovi li jam ne bezonis: la muŝo sidigis sur la oreton.

Cu mi povas ĉi tie informiĝi? — ripetis post minuto Voldirjov. — Mi estas Voldirjov, terposedanto...

Ivan Aleksejiĉ! — ekcriis la oficisto aeren, kvazaŭ ne rimarkante Voldirjov-on: — Diru al la komercisto Jalikov, kiam li venos, ke la kopion de la deklaro li atestigu en la policejo! Mil da fojoj mi jam diris al li!

Mi venas koncerne mian proceson kun la heredantoj de la princino Gugulin... ekbalbutis Voldirjov. La afero estas konata. Mi insiste petas vin, okupiĝi pri mi.

Ĉiam ankoraŭ ne rimarkante Voldirjov-on, la oficisto kaptis sur la lipo la muŝon, ekrigardis ĝin atente kaj forĵetis. La bienposedanto ektusis kaj laŭte purigis la nazon. Sed ankaŭ tio ne helpis. Oni daŭrigis ne aŭdi lin. Proksimume du minutoj daŭris la silento. Voldirjov elprenis el la poŝo paperrublon kaj metis ĝin antaŭ la oficisto sur la malfermitan libron. La oficisto eksulkigis la frunt-on, kun okupata vizaĝo ektiris la libron al si kaj fermis ĝin.

Malgrandan informeton... Mi volus nur ekscii, kiuraĵe la heredantoj de la princino Gugulin... Ĉu mi povas vin ĝeni?

Sed la oficisto, okupita pri siaj pensoj, ekstaris kaj gratante la kubeton iris ial al la ŝranko. Reveninte post minuto al sia tablo, li sin denove ekokupis pri la libro; sur ĝi kuŝis paperrublo.

Mi maltrankviligos vin nur por unu minuteto... Mi bezonas nur informeton nur...

La oficisto ne aŭdis; li komencis ion transkribi.

Voldirjov sulkigis la vizaĝon kaj senespere rigardis al la tuta plumknaranta kolegaro.

Ili skribas! — Li ekpensis, ekspirante. — Ili skribas, la diablo tute forprenu ilin!

Li deiris de la tablo kaj ekhaltis meze de la ĉambro, senespere mallevinte la manojn. La pordisto, denove trairante kun la glasoj, verŝajne rimarkis la senhelpan esprimon sur lia vizaĝo, ĉar li aliris tute proksime al li kaj mallaŭte demandis: Nu, kio? Ĉu vi informiĝis?

Mi petis pri informo, sed oni ne volas paroli kun mi.

Do donu al li tri rublojn — flustris la pordisto. Mi jam donis du.

Do donu ankoraŭ.

Voldirjov reiris al la tablo kaj metis sur la malfermitan libron verdan papereton (3 rubloj).

La oficisto denove tiris la libron al si kaj okupis sin denove pri foliumado kaj subite, kvazaŭ senintence levis la okulojn al Voldirjov. Lia nazo ekbrilis, ekrugiĝis, kaj lia vizaĝo sulkigis per rideto.

Ha... kion vi deziras? li demandis.

Mi volus informiĝi pri mia afero... Mi estas Voldirjov.

Tre agrable! Koncerne la aferon Gugulin? Tre bone! Do kion vi deziras, ĝuste dirante?

Voldirjov klarigis al li sian peton.

La oficisto ekviviĝis, kvazaŭ turnblovo lin ekkaptus. Li donis la informon, ordonis, ke oni skribu kopion, donis al la petanto seĝon — kaj ĉion ĉi en unu momento. Li eĉ ekbabilis pri la vetero kaj demandis pri la rikolto. Kaj kiam Voldirjov foriris, li akompanis lin malsupren sur la ŝtuparo, afable kaj estimplene ridetante kaj ŝajnigante, ke li ĉi-momente estas preta fali antaŭ la petanto teren. Al Voldirjov farigis ial konfuze, kaj obeante al la interna inklino, li elprenis el la poŝo paperrublon kaj donis ĝin al la oficisto. Kaj tiu salutadis kaj ridetis kaj akceptis la rublon, kiel artifikisto, tiel ke ĝi nur ekvidebligis kaj malaperis en la aero...

Nu, ekzistas homoj... — pensis la bienposedanto, elirinte sur la straton, ekhaltis kaj viŝis la vizaĝon per tuko.

Trad. J. Sapiro.

## KULTURO

**Memorindaj datoj en Novembro.** La 1. n. 1781 forigis imp. Jozefo II. servutecon en Aŭstria monarkio. — La 2. n. 1420 runinigis furiozanta popolo en Praha la kastelon Vyšehrad. — La 3. n. 1648 estis subskribita la »paco de Westfalen«. Fino de tridekjara milito. — La 8. n. 1620 okazis la batalo sur Blanka monto. Fino de la ĉeĥa memstareco. — La 10. n. 1483 nask. Martin Luther. — La 11. n. 1821 nask. F. M. Dostojevskij en Moskvo. — La 12. n. 1918 Aŭstrio siii deklaris respubliko. Nacia festo aŭstria. La 14. n. 1840 nask. en Parizo la franca skulptisto Aŭg. Rodin. — La 14. n. 1716 mortis en Hannover la fama germ. filozofo G. W. Leibnitz. — La 15. n. 1670 mortis en Naarden J. A. Comenius (laŭvere: Komenský). — La 17. n. 1869 estis finita la kanalo de Suez. — La 20. n. 1910 mortis L. N. Tolstoj en Jasna Poljana. — La 23. n. 1822 festa inaŭguro de la landa muzeo bohema. — La 24. n. 1632 nask. en Amsterdam B. de Spinoza. — La 26. n. 1812 Napoleon transiris la riveron Berezina. — La 27. n. 1701 nask. And. Celsius, la eltrovinto de centgrada termometro. — La 29. n. 1378 mortis Karel IV., la bohema reĝo kaj roma imperiestro.

**Interesa aperigo.** Estas jam bone konate, ke ekzistas diversaj kreskaĵoj, kiujn ni nomas karnivoraj, kiel ekzemple drozero (Drosera rotundifolia, longifolia, Nepeuthes kaj Utricularia). Nova, tute surprizanta afero estas, ke inter ili ni povas vicigi ankaŭ fungon, kiu kreskas en akvo, foophagus insidians. Ĝi ne estas ŝimo, sed kiel mi supre diris, fungo. Ĝiaj ĉeloj estas moveblaj kaj enkreskas en diversajn akvajn bestojn ĝenerale tra buŝtruo aŭ tra poroj en kutikulo kaj tute absorbas ĉion, kio estas interne de l' besto. Ŝajnas, ke tiu ĉi fungo estas ankaŭ danĝera al fiŝoj, same kiel ĉa ŝimo el grupo Saprolegniaceae. MUC. Riedl.

## DIVERSAĴOJ

**El la redakcio.** Pro mia kelktaga neĉeesto en mia hejmo amasiĝis por mi gravaj laboroj tiom, ke ne estis al mi eble ĝustatempe pretigi manuskriptojn por tiu ĉi numero. Kaŭze de tio ĝi aperas malfrue kaj mi petas pro tio afablan pardonon de niaj legantoj. Respondojn al la leteroj al mi lasttempe adresitaj mi forsendos en venontaj tagoj. — B. Tiftl.

**La Popola Universitato de Hus** en Plzeň havis feliĉan ideon organizi por siaj partoprenantoj de esperantaj kursoj ekskurson en Belgion, por tiel praktike montri la utilecon de Esperanto dum vojaĝoj. Danke al tre afabla helpo de samideanoj en Bruselo, Antverpeno kaj en Bruĝo la tuta ekskurso havis eminentan sukceson kaj la partoprenintoj (ili estis: s-o J. Pavlík, prezid. de Esp. klubo en Plzeň kun sia edzino, s-oj Prach kaj Salcman, inspektoroj de Polica prefektejo, Nedvěd, redaktoro de »Nová Doba«, Ant. Kubáček kaj Hess, fervojistoj, s-o Starý, imposta oficisto, Votrubeč, poŝta oficisto, Hess-filo, ing. Novák, direkt. de urba elektrejo, Salcman, komercisto, f-inoj Lábková, ofic. de la Pop. Univ. kaj Mařka Kubásková, s-oj Brožík kaj Tittl) neniam forgesos la agrablan tempon travivitan en la gastama lando. La detalan priskribon de la interesa vojaĝo ni priskribas en la felietono. Mencion meritas la fakto, ke la oficiala ĉeĥoslovaka presa oficejo »C. T. K.« informis ĉefajn enlandajn gazetojn pri tiu ĉi ekskurso ĉefe de la raporto al ĝi sendita el Antverpeno de s-oj Nedvěd kaj Tittl.

**S-o Jiří Bohutinský**, pentristo en Praha II., Paŝlákého nábreží 1672, pentras portretojn laŭ sendita fotografajo kaj liveras portretojn de D-ro Zamenhof (prezo 80—160 Kč). Ni lin varme rekomendas al niaj samideanoj kaj petas uzi liajn servojn.

**La II. konferenco de nordmoraviaj esperantistoj** okazis la 1. de oktobro en Národní dům en Prostějov. Krom la lokaj esperantistoj kaj gastoj partoprenis ankaŭ samideanoj el Bystřice p. H., Odrlice, Olomouc kaj Přerov. Je la 10. horo malfermis faka instruistino s-ino Havránková la kunvenon bonvenante ĉiujn. Sekvis propaganda parolado de s-ro Procházka el Odrlice pri la XIV. en Helsinko en ĉeĥa lingvo. Brua aplaŭdo rekomencis lian interesan paroladon. Post komuna tagmanĝo oni malfermis la laborkunvenon je la 14. horo. Prezidis s-ro Kudela, protokolis s-ro Malík. 1. Raportis la delegitoj pri la stato kaj movado en sia loko. Estis akceptata la deziresprimo, ke la delegitoj bone esploru sian regionon por havi statistikon pri ĉiuj esp-istoj. 2. Oni decidis zorgi pri publikigo de la manifesto de la Geneva konferenco en buleteno de moravia instruistaro kaj dissendi al estroj de mezlernejoj kaj interesataj institucioj po ekzemplero de tiu ĉi manifesta tradukaĵo. 3. Oni rekomendas al geinstruistoj samideanoj ekveki inter lernantoj intereson por esperanto kaj instrui pri ĝi private. 4. Oni akceptis la inviton aranĝi la IIIan konferencon en januaro 1923 en Bystřice p. H., kaj rekomendis kunigi ĝin kun okazigo de esperanto-akademio kun mallonga antaŭparolo en nacia lingvo. Oni kore dankas al Prostějovanoj por la tre bona preparo de konferenco. Ak.

**Kroniko. Praha:** Prepara kurso por esp. ekzamenoj, kiun aranĝas la Rondeto de esperantistoj, havas kvar sekciojn: Esp. gramatiko, historio de Esp., pedagogio kaj instrua metodo, ĉeĥosl. lingvo. En la 1a instruas red. H. K. Bouška, en la aliaj f-ino Šupichová, kiu aranĝis ankaŭ paroladojn 3. X. »Kion devas ĉiu Ĉeĥoslovako scii pri Esperanto« kaj 4. X. »Esp. kaj ĝia signifo por junularo« (en kunveno de gepatroj). Nova esp. rubriko estas en »Klas«, gazeto por lern. de burĝa lernejo. Ĝin gvidas f-ino Šupichová. — **Plzeň:** En la prepara kurso por esp. ekzamenoj, kiun aranĝas la Popola Universitato, partoprenas 21 personoj. Ĝis nun tie okazis jenaj paroladoj: La historio de la lingvo in-

ternacia (3 paroladoj: Unuaj provoj pri la lingvo intern., Esperanto kaj ĝia aŭtoro, aliaj projektoj de la lingvo internacia.), Organizo de esp. movado, Literatura kaj gazetoj esp. En la esp. kursoj de la Popola Univ. instruas B. Tittl. — **Asocio de Esperantistoj** aranĝas du kursojn por komencantoj. Ilin vizitas 86 personoj. Instruas s-o Přibáň. — **Plzeňec:** Kurso por 20 personoj aranĝata de Asocio de Esp. el Plzeň. Instruas s-o Přibáň. — **Líný:** La Distrikta Kleriga Komisiono per helpo de la Popola Univ. en Plzeň aranĝas kurson por 45 personoj. Instruas B. Tittl. — **Olomouc:** Kurson por 18 personoj gvidas s-o Nežžil el Neředín. Krom tio li instruas siajn lernantojn en la unuagrada lernejo pri Esp. — **Přerov:** Preskaŭ 200 personoj estas instruataj en kvar kursoj de s-o Malík. Tiu ĉi sukceso estas sekvo de propaganda parolado de s-o instr. Pavlíček el Bystřice p. H. la 30. IX. — **Ak. — Jaroměř:** Esp. klubo »Zamenhof« aranĝas du kursojn kun 108 personoj. La klubaj kunvenoj okazas jaŭde post la 19. horo en kafejo »U Andru«. — **Sviadnov ap. Místek:** Okazis du paroladoj de s-oj V. Jaroš el Místek kaj T. Kovalčík, kiujn sekvas kurso en la loka lernejo. Oni fondis tie ĉi Esp. Rondeton, kies honora prezidanto estas s-o Jaroš, prezid. Fr. Štihel, sekret. Kovalčík kaj kasistino f-ino Kneblová. La membroj dankas al la malnova ekzekutiva komitato por ĝiaj laboroj. — **Mor. Ostrava:** Komerca akademio enkondukis fakultativan instruadon de Esp. Partoprenas 15 studentinoj kaj 23 studentoj. — La Popola Universitato de Masaryk aranĝas kurson por 17 personoj. — La 15. nov. komenciĝis kurso por instruistoj. — **Vítkovice:** La Esp. Klubo komencis kurson la 28. okt. — **Přívov:** En la Burĝa lernejo estas kurso por 27 gelernantoj.

**La aŭtoro** de la »Sen-tema felietono«, enpresita en nia oktobra numero, estas s-o J. Šapiro el Bjalistok, Polujo.

ooo

## DANKESPRIMO.

Lidová Universita Husova v Plzni — La Popola Universitato de Hus en Plzeň, dankas publike al la belgaj esperantistoj, kiuj per sia afabla helpo agrabligis la restadon en Belgio al la partoprenintoj de ĝiaj Esperanto-kursoj. Ĉefe ĝi esprimas sinceran dankon al f-ino Jennen, la direktorino de elementa lernejo kaj al la gvidanto s-o Van Vynckt en Bruselo, al la societo »Verda Stelo« kaj ĝia eminenta prezidanto kaj deleg. de U. E. A. s-o F. Schoofs, kiu estis la ĉefa aranĝanto de la restado en Belgio kaj senlaca gvidanto tra Antverpeno, al s-o direktoro de urbaj oficoj, kiu akceptis kaj gvidis la karavanon en la Magistrata domo, al la Reĝa societo de Fotografarto kaj Sciencaj studoj, kiu ebligis kaj helpis la aranĝon de la publika parolado pri Ĉeĥoslovakujo, al s-o J. Swalf, la prezidanto de Esp. grupo de diamantistoj, kiu aranĝis la viziton en diamant-polurejo, ĉiuj en Antverpeno, al f-ino Y. Thooris, la deleg. de UEA, kaj al s-o Verbeke, la posedanto de Esperantista hotelo »Cornet d'or«, kiuj faris agrabla la viziton en Bruĝo.

Al ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj helpis iel ajn la belegan aranĝon kaj per sia ĉeesto montris sian simpatian al la membroj de la karavano ni esprimas tre koran dankon.

**Lidová Universita Husova v Plzni**

V. Patzák, sekretario. MUDr. Košák, prezidanto.



## BIBLIOGRAFIO

La esp. literaturo en la lasta tempo rimarkinde kreskas kaj vere estas dezirinde, ke oni aperigu ĉiam nur bonajn verkojn, kiuj stile eĉ enhave estas neriproĉindaj. Ni povas rekomendi jenajn librojn (ĉiuj estas broŝuritaj), kiujn ni ricevis:

**Aleksy Rzewski: Ekzilo.** Trad. K. Domsławski. Aperis en »Laborista bibl. intern.« en Warszawa. Paĝoj 60, form. 13×17 cm. La aŭtoro, nun urbestro de Lodź, jen priskribas siajn travivaĵojn en Siberia ekzilo. — **W. Fricke: Universala Legolibro.** Aperis ĉe Esperanto-eldonejo Ellersiek & Borel, Berlin. Paĝoj 76, form. 13×19 cm. Jen vere bonega legolibro, kiu meritas esti uzata en kursoj, sed pro sia interesa enhavo ĝi ankaŭ meritas troviĝi en la biblioteko de ĉiu esperantisto. — **Dr. H. Prölls kaj H. Sappl: »Die bisherigen Erfolge der Welthilfssprache Esperanto.«** Dritte verb. Auflage. Herausg.: Paulus-Verlag in Graz. Paĝoj 108 14×20 cm. Jen bela bildo de la ĝisnuna disvolviĝo de nia movado kaj de sukcesoj de Esp. — **Carolfi: Katolika Preĝaro.** Aperis en la sama eldonejo. Paĝoj 160, 8×12 cm. Ni ĝin rekomendas al la katolikaj esp-istoj. — **Montagu C. Butler: First Steps in Esperanto.** Published privately, obtainable from the British Esp. Association, London, 17, Hart Street, W. C. 1. A simple but very good book for english-speaking Beginners. (Pages 80, 12×18 cm.) — **Brüggemann: »Unua legolibreto«** (Univ. Biblioteko n-o 1.) kaj **Brüggemann: »Dua legolibreto«** (Univ. Bibl. n-o 2.). Ambaŭ aperis ĉe Esp.-Verlag Friedrich Ader, Dresden A 27. Paĝoj 64, 10×15 cm. La ambaŭ librojn ni rekomendas por kursoj. (Ĉe la libroj aper. en Germanujo ni ne montras la prez. ojn.)

»Bud' pripravený«, časopis slovenského skautstva a študentstva, práve vyšlo 1. číslo s bohatým obsahom a ilustráciami. Predplatné 10 Kč na pol roka. Adresa: Žilina, pošt. schránka 26.

**Dro. A. Batek: Čarovná věž.** (Druhá kniha románu »Ocelové paže«.) Stran 196, rozm. 19×14 cm. Nákladem autorovým (Břevnov, Kajetánka 30). Kniha tato předvádí nám nový typ románu jak svým dějem, tak i formou vyprávění. Čtenář seznámí se zde s nejnovějšími výzkumy různých odborů vědy, veden jest zde i do podzemních krápníkových jeskyní formou tak zajímavou, že ani není možno knihu odložit dříve, dokud není přečtena do poslední stránky. Autor sám, který naší lidovému věnuje celou svoji životní energii, jest sympatickým již tím, že patří mezi staré československé esperantisty. Knihu jeho vřele doporučujeme. Stojí 13 Kč.

### DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresos kostas 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmorkoj.)

**Král. Vinohrady** (Ĉeĥoslovakio), Mánesova ul. 92. S-o Ant. Jiravec deziras interŝanĝi P.M. kaj P.K. kun fremdlando.

### LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. Pech, Plzeň, Houškova ul. 4.)

**Sekcio Plzeň I.** En la leĝejo de Lab. Akademio komenciĝis la 10. okt. kurso, kiun gvidas s-o Pech (marde de 19—20. horo). Konversacio ĉiumerkrede en la sama halo.

**Sekcio Plzeň-Karlovo.** En la loka lernejo kurso por 17 kamaradoj. Gvidanto s-o V. Büchl.

**Sekcio Třebošná.** La 12. okt. okazis parolado de s-o J. Pech el Plzeň: »Kiun signifon por laboristaro havas Esp.« Al la kurso aliĝis 25 pers. Ĝin gvidas J. Interholzinger el Plzeň.

**Sekcio Újezd ap. Plzeň.** La kurso gvidata de s-o F. Hess el Doubravka komenciĝis la 1. okt.

**Sekcio Týmákov ap. Plzenec.** Post la propaganda parolado de s-o J. Pech el Plzeň oni komencis kurson en la loka lernejo. Ĝin vizitas 34 personoj. Estas interese, ke la lerneja direktoro estis amiko de Ido, kiu rekomendis tiun idiomon antaŭ la alveno de la parolanto.

**Ejovice ap. Rokycany.** Laboristaj gimnastikistoj aranĝas tie ĉi kurson por 28 personoj en la loka lernejo. Ĝin gvidas s-o J. Pešek el Plzeň.

**En Finnlando** Esp. rapide vastiĝas en laboristaj rondoj, juĝante laŭ la raportoj, kiujn ricevis la gvidanto de tiu ĉi rubriko. En Helsinko partoprenas preskaŭ 500 laboristoj en esp. kursoj. El Viipuri komunikas s-o Hannes Koivu, ke tie komenciĝis kurso por 40 laboristoj. En la Lab. Instituto li instruas preskaŭ 100 lab.

**Suomi, la lando de noktomeza suno.** La lumbildoj el la XIV. Esp. kongreso estis dum du semajnoj montrataj en la biografo en Laborista domo de Plzeň. Ĝi estas unu el plej grandaj haloj de la urbo, kie estas 1000 sidlokoj. La bildoj estas posedataj de s-o Pech.

### ESPERANTAJN SIGELMARKOJN.

Insignojn, poŝtkartojn kaj kaŭĉukajn stampilojn liveras

**Jozefo Kocourek, gravuristo,**

Vieno, X., Arthaber-Platz 3.—14. (Aŭstrio).

Postulu specimenaron de esper. sigelmorkoj kontraŭ 1 Kč. 100 diversajn sigelmorkojn mi liveras po 5 Kč afrankite.

**Via horloĝo funkcios precize** se vi ĝin donos por rebonigi al

**FR. NOVÁK,**  
horloĝisto en Praha I.  
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4-, afrankite Kč 5-, 1000 pec. Kč 35-, afrankite Kč 37-50.



Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.